

& La serĉanto de perdita spado:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Laŭ Ljuŝi Ĉunkiu. El ĉina tradukis S. J. Zee (El Popola Ĉinio, 61/2, p. 79). Baladigis Martin Strid (2016) per tradicia ĉina melodio kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,3:37> (/SOLA Do oRe Mi TISO LA DoIRe Mi So; La MiFa Mi MiSo La aSo La ILAlMi Re elDo Re;

(#Rekantaĵo: Mi SO OLA TI MiSO LA Do; SoSo Lado Ti iiLalSo La; SoSo Lado Ti iSo Mi)

)×8)+

(& Strofoj:

'1 /Foje spado de iu voja2ĝanto ; Falis en fluon de sur la bo3a2to.

(×: **Perdita spado en akvo ; Kiel li retrovu2 ĝin? ; Kiel li retrovu ĝin?**)

'2 Tuj signis li entranĉe sur la rando ; Por marki kie falis lia spado.

'3 Kiam ĉe l' bordo la boato haltis, ; Li senprokraste en riveron saltis

'4 De l' lok' signita por relevi ĝin ; El la ŝanĝema vasta akva sin'.

'5 Ĉion ĉi faris li kvazaŭ laŭplane. ; La rezultato? Kompreneble vane.

'6 Iuj kroĉiĝas dogme al doktrino, ; Aliaj faras ĉion laŭ rutino,

'7 Malsamaj tempo, loko kaj kondiĉoj ; Ne havas lokon en iliaj niĉoj.

'8 Kun sola vest' por ĉia ajn klimato, ; Ili forgesas ja la movon de boato.)